



MALGRANDA

REVUO

N:RO 3

1944

2-a JARO

PREZO: 1.- Kr.

ENHAVO:

	Paĝo
Malgrandaj ŝtatoj, de Karl-Gustaf Hildebrand.....	1
La virinoj en Svedujo, de Dagmar Persson	8
Savo kaj hejmenveno, de N. B. Ĥavkin	12
Instruo de naturo, de Ajo Allinger	14
Astronomia observejo en Turku, de Yrjö Väisälä ...	17
Iluziismo kaj materialismo, de Juan Régulo Pérez...	24
"Je la nomo de la vivo", de Einar Hult.....	28
"La angla karaktero" - debato	30
Poemoj	32

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Malgrandaj ŝtatoj

De KARL-GUSTAF HILDEBRAND

Karl-Gustaf Hildebrand estas fil. lic. en historio, eldonis poemojn kaj prosajn verkojn, estas redaktoro por revuo de kristanaj studentoj.

En iu loko en Grekujo oni povas laŭdire grimpi sur altan monton kaj de tie superrigardi tri el la regnoj de la fabela tempo. Pli grandaj ili ne estis.

Antaŭ tiu fakto oni povas reagi en du manieroj. Oni povas diri, ke la realo malantaŭ la fabelo estis ridinde malvasta; ĝia mondo malgrandiĝas antaŭ la vido, same kiel la rokoj kaj krutaĵoj de nia infanaĝo, kiam ni revidas ilin, fariĝas nur modestaj ŝtonoj kaj deklivoj. Oni povas fari ankaŭ alian rimarkigon: oni povas memori al si, ke tio, kio faras landojn memorindaj, ne ĉiam estas mezurata per kvadratkilometroj. Se la areo de Tiryns kaj Mykene ne estus pli granda ol monero, ili tamen restus por ni rimarkindaj lokoj. Kaj Agamemnon — malgraŭ ĉio — koncernas nin pli ol Timur Lenk.

Se ni reiras de fabelo al realo estas tute vere, ke la grandpotenco de Aten ne estas multe pli ol punkto sur la mondkarto kaj ke la peleponesa milito estis ia miniatura balkanpolitiko. Tamen neniuj politika areno fariĝos tiel granda, ke oni ne povas tie lerni de Tukydidis. Kaj la libera konstitucio de Aten — provinca laŭ amplekso kaj ofte korumpita — estas tamen grava por la mondo longe

post la polviĝo de la aleksandra regno. La historiistoj de la deknaŭa jarcento foje interprete enmetis en la malgrandan grekan mondon la tuton de sociaj kaj potencpolitikaj problemoj de la tiam Eŭropo. Foje estis ĝuste, foje ne. Sed la eraro ne estis en tio, ke la politika sperto ĉe grandaj popoloj estas tiel sublima kaj majesta aŭ entute tiom alia, ke komparo kun antikvaj malgrandŝtatoj ne estas ebla.

Ankaŭ la plej miopa povas kompreni, ke la malgrandaj ŝtatoj en nia tempo estas minacataj ne nur unuope sed ĉiuj kaj principe. Kelkaj el ili liberiĝos de la nuna subpremo, sed en la daŭro ili tamen estos minacataj. Eble estas, ke la nunaj malgrandŝtatoj iam ŝajnos same nereaj kaj fremdaj kiel Tiryns kaj Mykene. Povos veni tago, kiam oni vendos la lastan malgrandŝtaton por esti plezurloko por la pli grandaj — kun pafejo kaj aliaj logaĵoj.

Antaŭ tiu evoluo multe logas al rezigno. Ni kutimiĝis, ke la evoluo iras al pli kaj pli grandaj unuoj. Kiel nia propra lando iam formiĝis de komence memstaraj provincoŝtatoj, tiel — laŭ ofte remaĉata rezonado — nia lando kaj ĉiuj aliaj naturecese devas doni lokon al io ankoraŭ pli granda. Kaj ĉar en la realo ne estas penseble, ke la grandpotencoj oferos sian suverenecon favore al superŝtato — kiom ajn ili deklamas pri tio per bone elektitaj deputitoj — tiu impona logiko devas signifi, ke la malpli grandaj ŝtatoj devas cedi sian liberan ekziston favore al konvenaj grandpotencoj. La komparo kun la provincoŝtatoj ne estas malkonvena, ĉar ankaŭ ili malaperis laŭ la maniero de Ingjald Illråda¹.

Eble povos estiĝi situacioj tiel teruraj, ke tiaj kunigoj ŝajnos la malplej malbona solvo. Sed postuli ke ni benu tiun evoluon, trovu ĝin logika, kultura kaj agrabla, tio estas tro multe postuli.

En la bloko de la unuigitaj potencoj troviĝas, kiel ĵus montris prof. Myrdal, akra kontraŭeco inter grandaj kaj malgrandaj potencoj. Aliflanke tiu kontraŭeco apenaŭ

¹) Ingjald Illråda — sveda provincreĝo, kiu per ruzo kaj abomeninda perforto kuniĝis diversajn provincojn en pli grandan regnon.

atingos sufiĉan principan forton, ĉar malgrandŝtatoj, simile al iliaj sinjoroj la grandpotencoj, uzas grandan parton de sia tempo por malaprobi kaj kontraŭbatali aliajn malgrandŝtatojn kaj tiel ŝtelas forton de la komuna fronto. Sed almenaŭ kulture oni devus krei potencan kaj entuziasman propagandon por la idealo de la malgrandŝtatoj, por la neceso de la malgrandŝtatoj en la historio.

La historia klero tiurilate estas ofte manka, ankaŭ en la malgrandaj landoj mem: la estiĝo de la grandpotenca ideo kaj la linioj de la unuopaj grandpotencoj estas multe pli facile superrigardeblaj ol la gardoservo de la multaj malgrandŝtatoj por multformeco, diverseco kaj nuanca kulturkreado. "Malgrandŝtata studo" devus esti memkomprenebla fako por prelegistoj kaj studrondoj. Oni devus insiste atentigi grandajn homamasojn pri la ĝojo kaj honoro aparteni al malgranda popolo. Oni devus doni al tio certan krucmilitiran koloron, kvazaŭ temus pri aneco de minacata sed nelasebla kredo, de persekutata religio.

Tia krucmilitira spirito havas siajn klasikajn militsignojn, kie ĝi ĉiam havis ilin: en la memoro pri Helenujo kaj Palestino. Multaj ŝtatoj, grandaj kaj malgrandaj, almenaŭ laŭ la propagando sentis sin agi laŭ komisiono de Dio kaj kiel lia propra popolo. Ofte tio estis indigniga, ofte ankaŭ nur ekstera kaj surŝmirita afero. Sed kiam malgrandaj popoloj, batalantaj por sia vivo, memorigis pri la malgranda popolo priskribita en la biblio, tiam la komparo neniam estis sen certa realenhavo. Tiam temis pri popolo kun parencaj spertoj, popolo kiu antaŭe travivis la malgrandŝtatajn malfacilaĵojn de la malfruaj sekvantoj kaj tamen metis en la historion pli fortajn markojn ol la pli multaj grandaj nacioj.

Nederlandaj urbanoj gardante malantaŭ inunditaj kampoj aŭ filoj de svedaj bicnetuloj en garnizonoj en Livlando kaj Pomerujo enmetis en la malnovtestamentajn tekstojn ne nur fanatikecon kaj nacian fieron. Kun sincera kolegia intereso ili kvazaŭ akceptis saluton de similuloj, kiuj defendis similaĵajn poziciojn. Je la eksplodo de la finna vintra milito oni citis vorton el unu el la libroj de Samuel, ke Dio

povas venki per malmultaj same facile kiel per multaj. Por ni tio estas ĝenerala vero. La predikaŭskultantoj de la deksepa jarcento konatiĝis kun la situo malantaŭ la vorto. Ili sciis, ke tiujn vortojn diris la "honesta Jonatan", bonega militisto por sia tempo, antaŭ ekspedicio malantaŭ la linojn de la malamiko. Kaj en la popolo de Jonatan ili vidis modelon por tiu spirito, kiu, laŭ moderna esprimo, anstataŭigas kvanton per kvalito kaj per kolera volo al libero anstataŭigas la mankon en nombro. Kiam la militpastroj bone varmiĝis ili povis, kiel iam Johannes Rudbeckius², doni al sia publiko aliajn ekzemplojn: la arogantajn povus trafi la sorto de Xerxes, kiu marŝis kontraŭ la grekoj kun miliono da viroj sed tamen suferis grandan malvenkon. Multaj citis ankaŭ la klasikan heredaĵon. Diversaj popoloj rigardis sin ĝustaj heredantoj de la grekoj, kaj certe ili iamaniere estis, se oni lerte faris la komparon. Sed firma kaj klara fariĝis la simileco, kiam temis pri konkreta trajto: malgrandaj popoloj, kiuj batalis por sia kultura heredaĵo kaj inter siaj armiloj kalkulis ankaŭ la poezion. La ofte citita simileco rilatas i. a. al Finnlando, kie Runeberg³ verkis Fänrik Stål kaj Zilliacus tradukas grekajn tragediojn. En siaj vojaĝopriskriboj, kie la malabunda ĉiutaga vivo kaj la grandeco de la sorto ambaŭ ricevis sian lokon, Zilliacus faris kompleta la paralelon inter la militistoj ĉe Termopyle kaj la griza kohorto de Runeberg. Temas tie ĉi pri profunda interrilato. Nesaĝa politiko kaj malfeliĉaj aliancoj povas konfuzi ĝin sed ne forpreni ĝin plej profundan sencon. Estas io en la greka kaj biblia heredaĵoj, kio restos nekomprenata kaj morta, kiam ne plu ekzistos iuj liberamaj malgrandpopoloj, kiuj povos kompreni ĝin.

La praforto en la liberemo de malgrandpopoloj apartenas ne nur al la pasinto. Aktualaj krizoj montras, ke ĝi

²) Johannes Rudbeckius — svedo, grava figuro en eklezio kaj kulturhistorio. Mortis kiel episkopo 1646.

³) Runeberg — (1801—1877) la plej granda svedlingva poeto de Finnlando. Fänrik Stål estas grandioza poemaro pri la bataloj de la finnoj por sia lando 1808—1809. — Zilliacus — poeto kaj eminenta tradukanto de grekaj tragedioj.

vivas. Plej laste ĝi aperis momente dum la popola ribelo en Kopenhago. Kiam Grekujo liberiĝis en la 1820aj jaroj, ĝiaj loĝantoj parte elrevigis vizitantajn anglajn lordojn; sed certe estis postuli tro multe, ke longe miksitaj kaj dum jarcentoj nelibera popolo konsistu el marmore blankaj idealgrekoj aŭ el anglaj altklasuloj. Pri la marmora blankeco estu en la posta tempo kiel ajn; la grekoj ĉiuokaze 1940—1941 pruvis en plej alta grado, ke la tempo de malgrandaj popoloj ne necese estas pasinta. La sento, ke ili per tio faris al la mondo novan grandan servon, eble estas ĝojofonto por tiuj grekoj, kiuj ankoraŭ ne malsatmortis.

Povas ŝajni, ke la grandega energio, kiu troviĝas en la persisto de la malgrandaj popoloj kaj kiun spertis nuntempaj konkerantoj, estas kapitalo uzinda en la monda ekonomio. Oni ĝemas pro politikaj kaj ekonomiaj ĝenoj kaŭze de tro malgrandaj popoloj, kaj tiuj certe estas vcrāj, sed aliflanke ni ne forgesu tiun kreopovan koleron, kiun aperigis la konkuro kaj gardado de malgrandaj patrolandoj. Ni ankaŭ ne forgesu, kiom da energio estas ŝparata, se la popoloj rajtas mem elpensi siajn vivbezonojn kaj ne ricevas ilin laŭmezure de iu malfruiĝinta kaj dormema oficisto en Mondoŝtata organiza departemento, oficejo C 2078. Por tenci sin al la nedanĝera grundo de spirita kulturo, oni povas sugesti kiel la kolero de la norvegoj kontraŭ Svedujo dum la unia periodo kontribuis por stimuli ilian kulturalan kreopovon kaj tiel donis al la eŭropa literaturo nemalhaveblajn valorojn. Tiuj valoroj certe estis — bedaŭrinde — la sola daŭra rezulto de la unio.

Eĉ ekstrema malgrandŝtata ŝovinisto ne povas ne respekti certajn aferojn ĉe la "grandaj" popoloj, ankaŭ en ilia kulturo. Sed oni povas aserti, ke la malgrandŝtatoj reprezentas parton de la tuto, kiu estas nemalhavebla, kaj ke grandaj ŝtatoj havas riskojn kaj malfacilaĵojn, kiuj povas fariĝi sortogravaj por la tuta homa kulturo.

En tiu normigo, kiu minacas la mondon per egaligmorto, la malgrandaj ŝtatoj reprezentas la individuecon, la apartan, la vivrajton de esceptoj en tempo de ĝeneraligoj. En

la malgrandŝtatoj la homoj posedas tiajn limigitajn, firmajn kaj superrigardeblajn mediojn, kiuj tre ofte montrigis speciale taŭgaj por homa kulturkreado. La kulturo estus malpli riĉa ankaŭ en la grandaj landoj, se la florencanoj estus malfermintaj sian leonflavan urbon por la plej forta aŭ se la nederlandaj ribelantoj estus cedintaj antaŭ la duko de Alba. Vere estas, ke malgrandaj ŝtatoj, kun la premo de pli grandaj ŝtatoj ĉirkaŭ si, povas fariĝi ŝanceliĝantaj kaj spirite inundataj dum sia natura klopodado lerni de la ĉirkaŭaĵo. Sed la dogmo pri ilia necesa dependeco, ilia konsista aĉeco, estas sensenca grandpotenca kaprico.

Kontraŭe grandpotenco facile fariĝas esprimo por tiu tendenco al tro grandaj kaj senkarakteraj unuoj, kiu estas tipa por moderna historio kaj kiu en la daŭro kondukas al spirita degenero. Tiu tendenco estas pli danĝera en nia tempo ol iam antaŭe, ĉar nun la homoj ricevis teknikan ekipon por efika senvivigo de ĉio individua kaj aparta. Antaŭe estis longa vojo inter la centra potenco kaj la provincoj. Kion oni decidis en ĉefurbo, tio konsiderinde senemfazigis, dum oni sur ĉevalo aŭ sur ŝipo transportis la leteron al la randregionoj de la regno, kaj en la randregionoj la vivo restis la sama. Nun oni pli rapide laboras. Ne estas hazardo, ke nun multaj kontraŭ la idealoj de Hitlergermanujo volas meti la idealojn de Weimar, la spiriton de Goethe kaj Schiller kaj la novklasikismo; tiuj idealoj estis formataj en ŝtato, kies amplekso proksimume respondas al tio, kion rusa marŝalo okupas dum unu antaŭtagmezo. Ankaŭ ne estas hazardo, ke estis malgrandŝtato, la urbestro de la ĉefurbo de tre malgranda lando, kiu antaŭ kelkaj jaroj instruis al germana okupadgeneralulo la diferencon inter disciplino kaj kulturo.

Ofte oni kredas, ke unuopa civitano en granda ŝtato aŭtomate ricevas ian konkerantorigardon pri la mondo, ian kutimiĝon al grandaj perspektivoj. Tio estas videraro. Civitano en tro granda ŝtato ludas proporcie tiom pli malgravan rolon en la vivo de la propra ŝtato, ĝiaj aferoj fariĝas des pli komplikaj kaj nekomprenblaj, en multe li

estas multe pli naiva kaj sentopensa en siaj politikaj reagoj ol normala malgrandŝtatano.

Oni kredas ankaŭ, ke la pli riĉaj ebloj de grandŝtato asigni rimedojn kaj plani grandskale devas proporcie efiki altige al scienco kaj spirita kulturo ĝenerale. En malgranda ŝtato oni certe spertas, kion signifas tro malgrandaj asignoj, mankantaj rimedoj kaj mankantaj institucioj. Sed tiu flanko de la problemo ne estas la sola. Oni ne povas kalkuli sole laŭkvante; ju pli granda asigno des pli riĉa kulturo. Finfine estas la ideoj, kiuj pli malpli frue kreas instituciojn; ne la institucioj, kiuj elkovas ideojn. Oni nuntempe foje revas pri intelekta planmastrumado en iu aŭ alia formo, sed ordinare oni ne povas prezenti tiun universalgeniulon, kiu devus fari la planon. En ju pli granda formato oni planmastrumas por la spirito, des pli granda estas la risko. La malgrandaj ŝtatoj, en konvena intelekta kunlaboro kun la grandaj, certe havas ankoraŭ sian taskon ankaŭ en la intelekta kampo.

En printempa nokto antaŭ longe mi studis por ekzameno germanan libron pri slava literaturhistorio. Tie troviĝis sublima frazo koncerne la serban kaj kroatan lingvojn, kiuj ankoraŭ obstinas esti du diversaj lingvoj. Tial malŝerpa lando — proksimume tiaj estis la vortoj, — devis kontentigi pri du malgrandaj literaturoj, während sie sonst wenigstens eine mittelgrosse Literatur leisten könnten. Nordano kun silenta hontosento pensis pri la kompatinda mezepoka Islando...⁴

Kiam ankoraŭ ekzistas eĉ plej eta reala eblo por plua ekzisto de la malgrandŝtatoj, tiom longe ili ankaŭ havas taskon, kiu estas necesa por la tuta mondo: defendi la individuecon en la homa mondo, kontraŭagi la sennuancon laŭkvantan pensmanieron kaj per tio ankaŭ konservi la homan spiriton pura. Kiel dirite la evoluo povos malobligi ekziston de malgrandŝtatoj; sed kiam ankoraŭ ne prezentiĝis al la malgrandŝtatoj akcepteblajn alternati-

4) Nenordanoj atentu, ke estas ironio. La tre malgranda islanda popolo havas mirinde flegitan lingvon kaj malnovan literaturon, kiu estas eksterordinara. — La germana citaĵo: dum ĝi alie povus krei almenaŭ mezgrandan literaturon.

vojn por memstara ekzisto, ili ne havas kaŭzon senti sin malplivaloraĵ en sia daŭremo; ili defendas sanktan aferon. La sencon de tiu oni devus pli larĝe kaj pli kuraĝe diskonigi. De stultkuraĝo kaj trofiero certe gardos nin la okazontaĵoj mem.

Tradukis S. Engholm.

La virinoj en Svedujo dum la pasinta jarcento

De DAGMAR PERSSON

Dagmar Persson estis juna kaj fervora esperantistino en Borås. En la fino de majo en tiu ĉi juro ŝi mortis pro ftizo. La artikolo troviĝis inter ŝiaj postlasitaj paperoj.

Virina vivo antaŭ cent jaroj estis pli ol absurda afero. Tiam validis ankoraŭ la kruela leĝo: virino silentu en la eklezio. Sed poste okazis revolucia ŝanĝo en la vivo de la virino, kaj pri tio mi volas doni mallongan resumon.

Kia estis la situacio antaŭ jarcento, antaŭ kiam aperis la feminisma movado? En Svedujo ĝi estis relative bona kompare kun aliaj landoj. La svedaj virinoj ja estis rigardataj kiel homoj, eĉ estimataj kiel patrinoj kaj mastriinoj.

Jam de la tempo de Birger Jarl* ili rajtis heredi la gepatrojn, tamen nur duonon de frata parto, kaj laŭ leĝo el la sama tempo neniu rajtis difekti eĉ haron sur iliaj kapoj. Sed virino tamen ne estis viro kaj entute granda nulo, ia sencerba estaĵo, kiu havis vivrajton nur pro la prizorgoj al viroj kaj infanoj, — ne eĉ la flanko de la viro, sed ni diru eĉ liaj piedoj. Ŝajnas, ke ne multe ŝanĝiĝis dum la jarcentoj la opinio pri la valoro de la virinoj. Jene skribas Paŭlo: "Kristo estas kapo de la viro, kaj la viro estas

* Kuratora reganto de Svedujo 1250—1266.

kapo de la virino." Laŭ Paulo viro ne bezonas kovri sian kapon, ĉar li estas bildo de Dio kaj respregulas ties gloron, sed la virino respregulas la gloron de la viro, ĉar viro ne devenas de viro, sed la virino de viro. Kaj la viro ne estis kreita por la virino sed la virino por la viro. — Verŝajne la pli granda parto de la viroj en la komenco de la 19a jarcento tutkore konsentis kun la granda apostolo. Sed ekzistis aliaj, kiuj kuraĝe aŭ almenaŭ anonime asertis, ke la virina kompreno kaj intelekto escepte povas leviĝi al la nivelo de la viro. — "Vere instruata virino — se tia ekzistas — vekas nian admiron", skribas anonima verkisto, "sed ŝi certe ne feliĉigas nian koron." Li daŭrigas preskaŭ kiel Paŭlo: "La virino venis en tiun ĉi mondon por la viro, kaj la celo de ŝia edukado estas kompreneble igi ŝin pli taŭga por dolĉigi kaj plibeligi la vivon de tiu, kiu iam elektos ŝin kiel edzinon." Kaj por junulo la virino estas pli ĉarma, kiam li vidas ŝin silente atenta, kiam ŝi aŭskultas la instruan parolon de la firma viro. Sed ne ĉiuj virinoj povis akiri la enviindan rolon feliĉigi la koron de viro, simple pro tio, ke la virinoj estis pli multaj ol la viroj. Sed kiel vivtenis sin tiuj kompatindaj, superfluaĵ estaĵoj? En la bona, malnova tempo ili havis hejman laboron, sed kiam naskiĝis la grandindustrio kaj prenis de la hejmoj la pli grandan parton de ilia laboro, ili perdis siajn eblecojn. Kion fari? Tiu problemo trude postulis solvon. Kaj tiu problemo estis la kerno de la feminisma movado, kiu postulis egalecon, liberon kaj fratecon por la virinoj. La pioniro en Svedujo estis Fredrika Bremer (1801—1864). Mi ne rakontos multe pri ŝi, mi volas nur doni kelkajn detalojn pri ŝia edukado, kiu estis tiel tipa por tiu tempo, pri la preskaŭ-dresado en tiutempa ceremonia stilo.

Ĉiunmatene oni devis eniri al la patrino, kiu estis perfekta grandmonda sinjorino, gracie ŝvebi al ŝi, riverenci kaj kisi ŝian manon. Se la filinoj deziris promeni, la respondo ĉiam estis la sama: Al junulinoj ne decas promeni solaj, sed se vi deziras movi vin iomete, vi povas salteti ducent fojojn tenante la seĝapogilon. La patrino havis tri neŝanĝeblajn principojn: La filinoj vivu en absoluta

nescio pri la mondokazoj por havi nedifektitan koron, ili lernu kiel eble plej multe por evoluigi la societajn talentojn, kaj ili manĝu kiel eble plej malmulte por resti graciaj kaj zefiraj. Kaj la ĉefa celo kompreneble estis fari plej profitan edziniĝon. Tia stulta, supraĵa instruo estis torturo por inteligenta kaj sentema knabino, al kiu tamen mankis ĉiu ekstera premiso por societaj sukcesoj. Ŝi estis malbela, negracia, ĝenata, mallerta en manlaboro, kaj neniel ŝi povis kontentigi la postuleman potencon. El ŝia terura sento de malfeliĉo kreskis forta deziro helpi la kunfratinojn, kiuj simile al ŝi mem sopiris al sendependeco kaj kleriĝo por povi aktive kunhelpi en la socia laboro. Per sia bona kapo, granda koro kaj forta animo tiu eta virino iĝis la granda apostolo de la feminismo, kaj ŝiaj tendencaj romanoj, kiuj vekis grandegan sensacion, servis duoblan celon, atentigi la samtempularon pri ekzistantaj maljustaĵoj kaj devigi la virinojn senti sian valoron kiel homoj kaj socianoj.

La socio, familioj, eĉ virinoj avertis kaj kontraŭstaris, sed la afero progresis paŝon post paŝo. Kiam en 1844 en la parlamento estis propono pri egala heredrajto de frato kaj fratino, aŭdiĝis tuj peteganta voĉo: "Ne trodorlotu la virinon, tiun teran anĝelon, kiu estas riĉa pro siaj malmultaj bezonoj. Lasu ŝin estonte kiel nun esti kontenta pri sia sorto"! La propono tamen iĝis leĝo, kaj la unua grava paŝo por la emancipo estis farita. Sekvantjare pliboniĝis la laboreblecoj per decido pri komercrajto por virinoj. Kvankam ĝi rajtiĝis ŝin nur al tre modesta negoco, estis tamen progreso, ĉar antaŭe tia rajto estis nur escepta. Oni donis ĝin al vidvinoj kaj kriplulinoj kun la kondiĉo, ke ili ne rajtas havi virinojn kiel helpantinojn.

Memorinda estas la parlamento en 1856—58, kiam la virinoj ricevis plenaĝorajton de la 25a jaro — post grandega debato, en kiu multaj montris la saman opinion kiel Tegnér*: " — vinberbranĉo velkanta pro manko de

*) Granda sveda poeto 1782—1846.

apogo, estaĵo, kies duono mankas". Jen kelkaj citoj el la debato: "Se mi estus virino, mi protestus kontraŭ honoro, kiun, konante la ĉiopovan ordon de Dio koncerne veran virinecon, mi ne povus porti sen hontosento. Memstara virino estas absurdaĵo. Ĉar ŝi estas nek viro nek virino sed io meza. Ĉiu vera liberemo devas trovi sian savon en dependo kaj rezigno. En la momento, kiam homoj forigos tiun baron, ŝi iĝos volupte egoista kaj besteca, kaj ŝi estos sklavo de la plej malica el ĉiuj despotoj: de si mem." Kaj jene finas sian paroladon vera kavaliro de la virinoj, timante pri perdota ĉarmo kaj modesto: "Ne, sinjoroj, la torĉo de la scio, bruligita en la eterna flamo de la vero, ne jctos ombron aŭ makulos la liliojn de la senkulpeco kaj tute ne rabos eĉ eron de la bonodoro, kiu ĉirkaŭŝvebas la rezedon de la modesto, ĉar vero kaj belo neniel estas kontraŭstaraj sed male kompletigas unu la alian." Verŝajne la timo pri tiu infera metamorfozo de la virino, kiun esprimis la unua parolanto, ne estis tute motivita, ĉar post kelkaj jardekoj oni favoris la virinojn tiel, ke ili ricevis sian plenaĝecon samtempe kun la viroj. Kaj la edziniĝintaj virinoj baldaŭ liberiĝis de la edza kuratoreco.

Unu jaron post la menciita parlamento malkovriĝis nova laborkampo. Kial ne uzi en la popollernejoj instruistinojn anstataŭ instruistojn — kiuj lastaj per siaj malaltaj salajroj apenaŭ povis vivteni sin. Por virinoj kun iliaj pli modestaj pretendoj la sama salajro povus pli bone sufiĉi, kaj cetere, per sia milda pacienco kaj kompreno ŝi povus grave helpi en la eduka laboro.

Kaj jen en la fino de la 19a jarcento la virino okupis jam sufiĉe gravan lokon en la socia vivo, havis komunuman balotrajton, preskaŭ ĉiuj ŝtataj oficoj kaj edukejoj estis malfermitaj por ŝi. Mankis nur politika egaleco, kio kaŭzis multajn diskutojn sed longe neniun decidon. La kontraŭuloj tre elokvente prezentis sian argumenton, ke la virino estas kreita por la hejmo, "ŝi devas flegi la fajron sur la hejma altaro". Tiu ĉiama pli malpli bele vestita argumento estis respondata per jenaj vortoj: "Estas strange vidi, kiel miloj da viroj fuĝas el la hejmo al la restoracioj, sed subite

ili rememoras la hejman altaron, se temas pri virina balotrajto".

Malfacile solvebla estis tiu afero. Nur en 1919 ĝi solvigis, kaj du jarojn poste estis konfirmata la politika balotrajto kaj elekteleco de virinoj. Certe estis solena momento por la svedaj virinoj, kiam tri jarojn poste nia reĝo salutis niajn parlamentanojn ne plu per la vortoj "Bonaj sinjoroj kaj svedaj viroj" sed per "Svedaj viroj kaj virinoj, elektitaj reprezentantoj por la sveda popolo".

Sed kio estas la emancipita virino nun? Ĉu ŝi iĝis tia monstro? Ĉu ŝi, estante nek virino nek viro, detruis la plej subtilan de sia naturo, la nedifineblan virinan ĉarmon, kiu tiom inspiris la virojn al retorikaj eksceso, ĉu ŝi entute perdis aŭ gajnis? Pri la aliaj respondu la viroj, sed pri la lasta punkto mi povas respondi: E ĉ se ŝi iom perdis kiel virino, ŝi tamen multe gajnis kiel homo. Nun ŝi sentas sin preskaŭ egala al la viro. Mankas nur duoblecoj: la pastra kaj la militista, kio estas kontraŭdira, ĉar laŭ la viroj neniu aliaj predikas kaj komandas tiel instinkte kiel la virinoj.

Savo kaj hejmenveno De N. B. HAVKIN

(Del. de IEL en Jerusalemo.)

Ili komencas alveni. Estas brulstipoj savitaj el la fajro, la unuaj rifuĝantoj el la resto de la eŭropa judaro.

En Eŭropo ili estis persekutataj dum dekunu jaroj. Ili trapasis distancojn nemezureblajn, ili estas savitaj el la dezerto de la homaro, el kazo simila al tiu, kiu estis antaŭ la kreo de la mondo.

Ili ne estas solaj. Iliaj fratoj venas el Jemen, kie judoj kaj araboj ankoraŭ vivas kiel iliaj prapatroj antaŭ jarmilo. La 14an de decembro 1943 revenis judoj el Jemen al la

lando de siaj prapatroj. Ili eniris Palestinon per vagonaro. Kun miro kaj ne sen suspekto ili rigardis la orangejojn apud la fervojo kaj la miraklojn de la nekonata okcidento. Ilia plej kara posedo, kiel tiu de la tuta juda popolo, estas Torao, la Kvinlibro de Moseo. Dum multaj generacioj ili sopiris al la lando de Israel, kaj ili trovas, ke tiu lando estas por ili kvazaŭ nova lando.

Ili piede trapasis longajn distancojn en Jemen. En Aden ili devis atendi, kelkfoje dum jaroj, por ricevi enirpermeson pere de la Juda Agentejo por Palestino. Tiu agentejo donis al ili vestojn, kaj American Joint Distribution Committee (helpkomitato) pagis ilian vojaĝon ĝis Suez. Tie judaj soldatoj akceptis ilin kaj lokis ilin en vagonaron. Por la unua fojo en sia vivo ili vidis tian. En la matenhoroj ili sin trovis en la Sankta lando, lasinte la mezepokon malantaŭ si.

Unu semajnon poste la saman vojon iris rifuĝantoj el Polujo, venantaj el Teheran. Ili saviĝis el la brakoj de la naciisma monstro, dum iliaj fratoj mortis turmentataj antaŭ iliaj okuloj, dum gepatroj kaj infanoj estis mortigitaj per gazo aŭ maŝinpafiloj. Ili forkuris en Rusujon, kaj dum monatoj kaj jaroj ili agoniis en Siberio kaj Centra Azio. Multaj mortis pro malsato kaj malsano, sed tiuj trovis vojon al la ĉefurbo de Iran, Teheran. Tie ili trovis kontakton kun la Juda Agentejo kaj la Amerika komitato, kiuj donis al ili medicinan helpon kaj vestojn kolektitajn en Palestino. Nun ili grupon post grupo venas al sia fina hejmlando.

La "Infanoj de Teheran" antaŭ unu jaro venis per helpo de la Organizo por Junulara Enmigro, kaj ili jam hejmiĝis en lernejoj kaj agrikulturaj kolonioj. Nun venas la lastaj rifuĝantoj el Teheran. Ilia vojo estis pli terura ol tiu de iliaj samnacionoj el Jemen. Tiuj judoj liberiĝis el multaj landoj vere laŭ la promesvorto de la bibliaj profetoj, kaj laŭ tiu vorto ili fine eksidos "ĉiu sub sia vinarbo kaj sub sia figujo".

Antaŭ la milito homoj irontaj al Palestino estis speciale preparataj kiel pioniroj. Sed nun oni devas rapide savi

homojn el mezo de fajroflamoj. Ne estas tempo por elekto kaj preparo.

Ili venas por trovi panon ĉiutagan, por liberiĝi de malsano, malsato kaj persekuto. Sed ili estas destinataj por pli alta celo, por fariĝi organa parto de ilia revivigata nacio. Multaj kripliĝis kaj rompiĝis dum la jaroj de sklaveco, sed ilia spirito restis forta. Ankaŭ ili nun fortigos sian nacion en la komuna batalo kontraŭ mallumo kaj en fervora rekonstruo de la hejmlando, kaj iliaj infanoj nun helpas formi la estonton de Israel kaj ĝia lando. Tiel ilia savo estas nur komenco. Sed oni devas sukcesigi tiun komencon por povi iri antaŭen.

La savo de kelkaj centoj aŭ miloj estas ne nur savo de individuoj: estas simbolo, promeso kaj espero por aliaj kaj por la tuta juda popolo.

Kiom ni ankoraŭ povos savi? Ni tion ne scias, kaj ni ne scias, ĉu la vivrestontaj estos sufiĉe fortaj por kapti la savantan manon etenditan al ili. Sed tion ni scias: la lando de Israel donis esperon, donis forton dum la milito al centoj, miloj kaj milionoj kaj faris por ili la amaran histori-proceson plena de alta signifo.

Tiuj niaj vortoj estas dirataj al la judoj en Palestino kaj en liberaj landoj. Sed ili trovos vojon per miloj da kanaloj ankaŭ al tiuj, kiuj ankoraŭ vivas kaj esperas en la suferanta Eŭropo. Al ili ni devas doni konsolon, diri al ili, ke ilia espero kaj la nia ne estas perdita, ke ili ne estas solaj, ke ili posedas hejmlandon kaj gloran estonton en tiu hejmlando.

Instruo de naturo

De AJO ALLINGER

Oni ne povas taksii homon laŭ la skalo "klara" aŭ "mal-klara", sed oni povas sufiĉe certe juĝi lian homan kvaliton laŭ lia rilato al la naturo. Homo, kiu sentas sin aparteni

al la naturo, kiu emociiĝas de ĝia spektaklo, kiu povas ĝojiĝi pro pejzaĝo aŭ floro — pri li oni scias, ke li, eĉ se oni ne ĉiurilate povas nomi lin klara, almenaŭ ne estas malbona homo. Troviĝas kvalito en lia animo, kapablo akcepti la realajn valorojn de la vivo. Homo, al kiu mankas tiu kontakto kun la naturo, kiu ne gajniĝas aŭdante la jubilon de la merlo, kiu ne ricevas infanĝojn en la rigardo ekvidante la unuan floron de la printempo — tia homo estas malplena ulo, morta animo, kaj li havas malmultan scion pri tio, kio estas vivanta kulturo.

En la naturo ĉio estas vera kaj malfalsa kaj ĉio eterne egale pura. La naturo estas trankvila, simpla kaj serioza, kaj ĝi parolas al la simpleco kaj natureco de la homo. La naturo parolas al tiu, kiu estas parenca al ĝi mem. Sed ĝi estas senfine malproksima de la hazarda kaj malgrava, de la bruoj kaj tumulto de la kulturo, de la ĉiutaga varieco. Kiu venas plena de tio, tiu trovas en ĝi malmulte, kio estas aŭskultinda.

La naturo estas la patrino de ni ĉiuj, nedorlatanta kaj nesentimentala edukantino. Ŝi ne karesas. Ŝi instruas al ni siajn leĝojn, ripetas kun eterna pacienco, ke tiel estas, tiel sed ne alie. Oni povas obei aŭ en certaj okazoj obstini — sed tion oni faras je propra respondo. La leĝoj de la naturo funkcias sen permesi al ni lerte kaj flate elturniĝi. Ili efikas senindulge aŭtomate, pro neceso.

Oni povas nomi la naturon granda instrulibro kun viva, moviĝanta skribo. Ĉio formita, konstruita kaj inventita de la homo troviĝis antaŭe en la naturo kiel plano kaj skizo. De la groto de la sovaĝulo kaj liaj unuaj palpaj provoj de kulturado, de modeloj de hejmteksistino ĝis la mirakloj de la tekniko, jen estas la naturo, kiu antaŭiris kaj de generacio al generacio paciencie montris siajn modelojn. Multege ni lernis, multege restas por lerni.

Tiel la naturo instruas la homon diversmaniere por kopo kaj menso, instruas, kio estas necesa por nia vivo, devigi nin vekigi el inerto kaj flegmo, tranĉas nian egoismon, kiam ĝi tro grandiĝas. Por multaj el tiuj, kiujn la kulturo faris komfortemaj kaj stultaj, estus utile reiri en

la bonan lernejon de la naturo, esti trudataj helpi sin mem kaj miniature trapasi iom de la evoluo, kiun la homaro kiel tuto trapasis sub gvido de la naturo mem. La vivo tiam klariĝus kaj simpliĝus por ili, la rigardo malfermiĝus por la sole necesa en nia ekzisto, kaj ili lernus rideti longan ridetadon pri la multaj necesaĵoj aferoj, pri la imagitaj bezonoj, pri ĉio sensenca kaj absurda, per kio la kulturhomo forfrivolos sian tempon.

La naturo havas ankaŭ spiritan enhavon. Ĝi havas belon kaj konsolon por donaci al ĉiuj. Ĝi donas siajn silentajn kaj profundajn respondojn al ĉiuj niaj demandoj. En ĉiuj tempoj la homoj ĉerpis instruojn el la naturo kaj transportis ilin sur la spiritan terenon. La naturo donis nutron al la pensado, al arto kaj religio. La poezio ne ekzistus sen ĉi tiu intima kontakto inter la vivanta naturo kaj la homanimo. La mondo de la naturo estas spirita sanofonto, kaj se nia tero ne portus florojn, ni ĉiuj estus multe pli malriĉaj en niaj pensoj, pli malmolaj en niaj animoj.

Maloŭte ni pripensas, kian gigantan ĝojfonton ni havas en la naturo. Ni neniam plene taksas tion, kio kuŝas proksime kaj kion ni ricevas donace. Kiu atente preterpasas herbejon plenan de feste kolororiĉaj floroj, al li tiu belo eniras en lian intermon. Kiu kontraŭe preteriras apatie, tiu sendube perdas multe de la odoro kaj koloro de la herbejo, sed ili tamen respeguliĝas por li kvazaŭ ia pliheliĝo en la animo, kiel bildo, kvankam efemera, de io bela kaj ĝojiga. Miloble ĝi donacas al tiu, kiu havas la ĝustan okulon kaj la ĝustan oreilon.

La universitata astronomia observejo en Turku De YRJÖ VÄISÄLÄ

(La antaŭa ĉefurbo de Finnlando, Turku, havas simile al Praha du universitatojn: finnlingvan (Turun Yliopisto) kaj svedlingvan (Åbo Akademi). Inter la profesoroj de la unua estas du esperantistoj, la fratoj Väisälä. Unu el ili estas aŭtoro de tiu ĉi artikolo. Inter fakuloj li estas mondfama.

En artikolo en la dana revuo *Naturens Verden* rimarkigas Elis Strömberg, ke ĉe ĉiutagaj gazetoj tiam kaj tiam anoncas trovojn de kometoj kaj planedoidoj (malgrandaj planedoj) faritajn en la universitata observejo en Turku. Fakuloj konstatis, ke tiu universitato evoluigis forte kreskantan astronomian agadon dum sia nelonga ekzisto. La universitato estis fondata en 1922 kun du fakultatoj, humanista kaj matematika-naturscienca. La lasta havis komence nur kvin profesorojn por matematiko, fiziko kaj kemio. En 1924 oni komencis iom post iom instrui ankaŭ astronomion. Tion faris Yrjö Väisälä, profesoro de fiziko. La evoluo post la modesta komenco estas longa historio kun multaj interesaj detaloj.

Inter aktualaj problemoj de internacia astronomio troviĝas serĉado de novaj planedoidoj kaj kalkulado de iliaj orbitoj (vojoj ĉirkaŭ la suno). Jarraporto pri tiu esplorado (1.7.1942—30.6.1943) diras, ke el 241 planedoidoj trovitaj dum tiu periodo 124, t. e. 51,5 %, estas trovitaj de Yrjö Väisälä kaj liaj helpantoj. Turku ankaŭ kalkulis grandan nombron de la orbitoj.

Pro ĉiam nesufiĉaj monrimedoj la necesaj instrumentoj estis pretigitaj de la universitato mem. Profesoro Väisälä funkciis ne nur kiel fizikisto-optikisto, kalkulante kaj planante ĉion por la instrumentoj kaj la observejo, sed ankaŭ kiel inĝeniero, konstruisto, masonisto kaj ĉarpentisto, meĥanikisto kaj metallaboristo, frotumisto* de lensoj kaj fine denove kiel teoria kaj praktika optikisto, astronomia observisto, teoriisto por kalkulado de orbitoj, kalkulisto (sur papero kaj per maŝino) ktp. Kiel sumo de ĉio li nomis sin *amatora astronomo*.)

Vilho Setälä.

Turun Yliopisto estas fondita per amaso da malgrandaj donacoj de la finna popolo kiel "privata", t. e. neŝtata altlernejo. Ĝia budĝeto kompreneble neniam estis amplek-

*) Frotumi — per skrapado kaj polurado pretigi la surfacon de lenso.

sa. Komence astronomio ne apartenis al ĝia instruplano. En 1924 oni tamen komencis doni iom da tia instruo, kaj en 1927 estis fondata profesora ofico por astronomio. Pro manko de mono ĝi tamen ne estis kiel ordinara ofico, kaj la profesoro de fiziko estis ordonata apud sia ordinara ofico zorgi pri la taskoj de la nova fako.

Ĉar astronomio estis nur flanko fako, la rimedoj asignitaj por ĝi estis ĉiam malgrandaj. La budĝeto por fondado kaj prizorgo de la observejo estis dum la tuta tempo ĝis nun nur 12.000 markoj (ĉirkaŭ 1.000 svedaj kr.) ĉiujare. Estas klare, ke sur tiu bazo oni povis fondi observejon ĉefe nur por instruaj celoj.

La fizika instrumentaro de la universitato enhavis kelkajn astronomiajn aparatojn, i. a. transporteblan teleskopon. Tiun oni metis nokte sur betonan fundamenton en la korto de la universitato.

La universitato posedas bienon ĉe la limo de la urbo, kaj tie oni poste konstruis observejon, kiu konsistas el kupolo ĉambro kaj antaŭĉambro. La kupolo estis konstruata sur la tero, kaj 20 studentoj levis ĝin al ĝia loko. Ĝi estas facile turnebla sur tri lagrogloboj de SKF. La kosto por la tuta konstruaĵo estis ĉ. mil kronoj.

Sub la kupolon oni lokis la suprenomitan teleskopon, refraktoron* kun aperturo de 9 cm kaj fokusa distanco de ĉ. 1,5 m. Ĝi estis uzata por instruo. Tamen oni foje sukcesis fari per ĝi ankaŭ sciencajn observojn. En 1927 aperis kometo (Skjellerup-Maristany) tre proksime al la suno kaj tial observebla nur tage aŭ tuj post sunsubiro. Per nia simpla refraktoro ni povis pli malfrue ol en aliaj observejoj difini la lokon de la kometo antaŭ ĝia malapero en la radioj de la suno. El tio oni vidas, ke ankaŭ amatoraj astronomoj povas kun bona ŝanco fari utilajn observojn.

Por celkonscia scienca laboro estis necese posedi pli grandajn kaj pli kompletajn instrumentojn. Sed pro manko de rimedoj restis por ni la sola vojo mem konstrui niajn

* La fakvortoj estas internaciaj. Klarigojn vi povos trovi en iu nacia enciklopedio.

ilojn. Estis facile elekti inter refraktora kaj reflektora teleskopoj, ĉar la dua estas multe pli malkara.

Jam pli frue mi lernis frotumi spegulojn kaj lensojn. Tiel la kosto ampleksos nur materialon kaj fabrikadon de metalaj partoj. Tiuj lastaj tamen estis farataj en nia propra laborejo. Tiel estis pretigata teleskopoj de la tipo Cassegrain kun du speguloj, unu parabola konkava kun 35-cma aperturo kaj unu konvekso hiperbola. La tuta fokusa distanco estas iom pli ol 5 metroj.

Nia intenco estis krom la fotometraj laboroj komenci sisteman observadon de kometoj kaj planedoidoj laŭ metodo, kiun mi elpensis jam antaŭ 15 jaroj. Origine ni volis tion fari per okula observado. Sed intertempe la ĉasado de planedoidoj tiom progresis, ke la eble trovotaj novaj planedoidoj jam estas tre malgrandaj kaj ne observeblaj per nia teleskopoj. Ni do devis sekvi la progreson kaj ekuzi fotografadon kiel ilon por la ĉasado.

Sed por tiu celo la teleskopoj de Cassegrain ne estis konvena pro sia malgranda relativa aperturo (1:15) kaj sia malvasta vidkampo. Por tio ni volis konstrui mezgrandan trilensan anastigmaton. Pro la multekosta optika vitro ni povis pensi pri maksimume 20—25-cm aperturo. La kalkuloj por la objektivo — postulantaj multegan laboron — jam estis pretaj, kiam aperis la revolucia teleskopa konstruo de Schmidt.

La teleskopoj de Schmidt konsistas el sfera spegulo kun antaŭmetita korektolensoj, lokita ĉe la centro de la sfero. Per tiu aranĝo oni atingas kun granda aperturo rimarkinde vastan kampon. La kampo estas tamen ne ebena sed sfera, pro kio Schmidt uzis filmojn premitajn sur konveksan surfacon.

Komprenoble estus avantaĝe povi uzi ebenajn plakojn por la fotografado, kaj tio estas ebla, se oni kontentigas per malpli vasta kampo.

Nun estis proksima la ideo ebenigi la kampon per uzo de ebenkonvekso lenso antaŭ la plako. Nome, se fasko da konvergaj radioj trairas ebenparalelan vitron, la konverĝa punkto estas ŝovata antaŭen, kaj des pli ju pli dika estas

la vitro. Same pri lenso, kaj ĉar ĝi estas pli dika meze ol ĉe la randoj, la antaŭenpuŝo estas pli granda en la mezo. Per tio la sfera bildkampo do ebeniĝas, se la formo de la lenso estas ĝuste elektita.

Per tiu aranĝo la sfereco de la kampo estas korektebla, sed samtempe aperas aliaj aberacioj (mankoj de la optika bildo), speciale "komo" kaj distorsio (kurbiĝo de rektaj linioj ĉe la randoj). Mi konsideris, ĉu estus eble forigi tiujn ĝenojn per ŝanĝoj de la sistemo. La rezulto estis, ke — krom tre malgrandaj restoj de astigmateco kaj kromateco — ĉiuj mankoj de la optika sistemo estas forigeblaj per anstataŭigo de la ebenkonvekso lenso per konvenforma duoblekonvekso kaj per ioma ŝanĝo en la pozicio de la korektovitro. La restaj mankoj estas tiel malgrandaj, ke ili ne influas al la akreco de la bildo. La sistemo do estas praktike anastigmata.

Unue mi konstruis provan teleskopon en 1934, kun aper-turo de 17 cm kaj fokusdistanco de 34 cm, do relativa aper-turo 1:2. La rezulto estis ĝojiga: la bildoj de la steloj estis akraj kaj malgrandaj sur cirklo kun 5-cm diametro (8 gradoj de la ĉiela arko). Por komparo ni notu, ke parabola spe-gulo kun nur 13-cm aper-turo, troviĝanta en nia observejo, donas egale akrajn bildojn sur maksimume 6-mm cirklo. Per la nova sistemo ni do povas fotografi areon centoble pli grandan ol ni atingas per simila parabola spegulo.

Ĉar tiu provo montris, ke ni sukcesis venki la malfacilaĵojn en frotumo de komplika (nesfera) surfaco de korek-tovitro, malfermiĝis al ni ncantaŭviditaj ebloj konstrui taŭgan planedkameron. Limojn por grandeco metis la kos-to de materialo kaj de la metalaj partoj. Mi decidiĝis pri 50-cm aper-turo kaj iom pli ol 1-metra fokusdistanco, ĉe kio 1 mm sur la plako respondas al 200 arkaj sekundoj. Kiel plakoformaton mi elektis 12×12 cm, kun lumigita cirk-lo kun 12-cm diametro, responde al 6° 40'.

Printempe 1934 mi komencis la fabrikadon. La vitro por la spegulo kun 62-cm diametro devenis el Francujo kaj es-tas simila al tiu de la granda teleskopo de Mount Wilson. La korektovitro estas el Jena-a borosilikata kronvitro.

Frotumante la spegulon ni devis forskrapi ĉ. 10 kg da vit-ro. Malgraŭ tio la korektovitro postulis multe pli da labo-ro, kvankam ĝia plej granda obenomanko estas 0,08 mm. En septembro en la sama jaro la nova teleskopo estis en tia stato, ke ni povis provi ĝin, kaj ĝi plenumis niajn espe-rojn. La teleskopo estis provizore muntata anstataŭ la Cassegrain-teleskopo, sed samtempe ni komencis konstru-on de nova observejo, kaj en novembro 1937 ĉio estis tiel preta, ke ni povis komenci la observadon.

La nova observejo estas konstruita por longedaŭra uzo. La muroj estas el brikoj, la kupolo el masonito sur ligna skeleto. En la domo estas meridiana ĉambro, provizore sen instrumento, kupola salono kun 6-m diametro (la unua kupolo havis nur 4 m., kaj laborĉambro por la observ-isto, por interŝanĝo de plakoj ktp. La rivelado okazas ta-men en la fizika laborejo de la universitato.

La teleskopo konsistas, krom el la nomita anastigmato 1:2, f = 103 cm, el serĉa kaj cela teleskopoj kaj horloĝa mekanismo, per kies helpo ĝi konstante rigardas al la sa-ma punkto sur la ĉielo, elektita je la komenco de la observ-ado. Ni uzas la plej sentemajn plakojn, ekz. Agfa Isopan, ĉe kio ni ricevas per 6-minuta ekspono stelojn ĝis 17a aŭ 17½ grandeco.

La serĉado de planedoidoj baziĝas sur jena procedo. Se oni fotografas longe iun lokon de la ĉielo, ĉe kio la tele-skopo la tutan tempon celas al la sama punkto, la steloj bildiĝas kiel punktoj, sed la planedoj, kiuj dume moviĝas rilate al la steloj, desegnas mallongan strekon. Tiuj stre-koj fariĝas tamen tre mallongaj, se la objektivo estas su-fiĉe lumforta por ĉasado de malgrandaj planedoj, kaj ili estas malfacile distingeblaj inter la duoblaj bildoj de prok-simaj stelpartoj, inter difektoj kaŭzitaĵoj de polvoj ktp. Pro tio estis necese fari komparan eksponon je alia tempo. De 1935 mi tial uzis jenan novan metodon. La plako estas eksponata dufoje kun minimume duonhora intertempo, sed tiel, ke la celpunkto de la teleskopo dum la intertempo es-tas puŝata en la deklinacia cirklo ĉ. 20 arkajn sekundojn.

La steloj estas bildigataj kiel punktoparoj kaj la planedoparoj kun iom alia direkto. Ĉe tio preskaŭ forestas la danĝero intermiksi stelojn kaj planedojn. Samtempe la movado de la planedoj estas difinebla pli precize, kaj la lumforto de la planedoj estas pli facile komparebla kun tiu de la steloj.

Ĉe la punktopara metodo oni povas ankaŭ procedi tiel, ke 3 ĝis 5 plakoj estas eksponataj unu post la alia sur nesamaj arcoj sur la ĉielo, unu apud la alia. Post tio oni revenas al la unua plako, faras sur ĝi la duan eksponon kun la malgranda celdifereo ktp. Per tio oni atingas proksimume trioblan rapidecon kaj povas eksponi kvin areojn dum 1½ horo.

La nerektajn punktoparojn sur la plakoj oni serĉas en speciala aparato per helpo de lupco. Tio iras rapide kaj kun certeco. Foje ni trovis sur unu plako 9 planedoidojn, el kiuj kvar estis novaj.

Post tiu serĉado sekvas la preciza mezurado de la loko de la planedoidoj. La rezultojn kolektas la Kalkula Instituto en Berlin-Dahlem (Kopernikus-Instituto). Kiam la sama planedoido estas observita 4—5 fojojn dum minimume 6 semajnoj kaj ĝia orbito estas kalkulita, ĝi ricevas numeron. Ankaŭ por la kalkulado de la orbitoj ni uzas nian propran, tempoŝparan metodon.

Trovita planedo kun kalkulita orbito povas esti retrovata, kaj ofte okazas, ke planedoido, kiun oni kredas nova, estas per la kalkuladoj rekonata kiel malnova konato. La konata astronomo dro Asplind estas speciale lerta en rekono de konatoj, kaj tial oni povas diri, ke ni certamaniere estas antagonistoj: mi per ĉiuj rimedoj klopodas kreskigi la nombron de la konataj planedoidoj, dum dro Asplind per sia tuta kapablo klopodas malgrandigi ĝin.

En la unuaj jaroj, kiam niaj instrumentoj estis nur provizore muntitaj, ni trovis nur unuopajn planedoidojn, entute 29. Sed poste ni povis komenci amasĉasadon. Jam dum la unua duono de 1938 ni trovis 60 novulojn.

Ni celas antaŭ ĉio ricevi ĝustan imagon pri la distribuo de la planedoidoj en ĉiuj direktoj de la spaco. Interesa es-

tas ankaŭ la difino de la grandeco de la planedoidoj. Al tio oni povus aldoni difinon de ilia kolorindico. Tio estas ebla per uzo de pankromataj plakoj kaj interŝanĝo de la lenso kontraŭ alia el kolorita vitro, per kiu metodo ni povis fari fotografaĵojn en diversaj spektraj partoj de ultraruĝo ĝis violkoloro.

Por efike realigi tiun sisteman observadon de la planedoidoj mi planis novan teleskopon, per kiu estos eble fotografi kvaroble pli grandan areon ol per la priskribita. Ĝi konsistos el du tuboj kun 70-cm fokusa distanco kaj tiel muntitaj, ke la du tuboj samtempe celos al tute apudaj cirkloj sur la ĉielo. Por ke ĉiu el la tuboj donu klarajn bildojn sur areo duoble pli granda al la antaŭa, mi volas deformi ankaŭ la spegulon nesfera.

Per tiu duobla teleskopo estos eble per du-trihora monata eksponado fotografi ĉiujn je nia latitudo videblajn planedoidojn. Tiu teleskopo certe ne kaptos la plej malgrandajn planedoidojn videblajn per la nun uzata, sed tio estus kompensata per tio, ke ni ricevus sufiĉe da materialo ankaŭ dum tiuj sezonoj, kiam klaraj noktoj estas maloftaj. La nuna teleskopo servus daŭre por observo de la plej malgrandaj planedoidoj.

Krom tio mi revis pri havigo de konsiderinde pli granda teleskopo kun granda vidkampo. Pri la intencita aplanata konstruo mi raportis en *Astronomische Nachrichten* 1936. La fokusa distanco estus ĉ. 2 metroj, kaj kun 70-cm aper-turo oni povus ricevi klarajn bildojn sur cirklo de 10—12 cm. Tia teleskopo estus i. a. utila por sekvi kiel eble plej longe objektojn kun tre malforta lumo.

Fine mi volas noti, ke se la cirkonstancoj ne permesos al ni efektiviĝi nian vastan laborprogramon, ni ĉiam povos konsoli nin per tio, ke ĉiu planeda observo ankaŭ en si mem havas sian valoron, kaj ke ĉiu eksponita plako restas kiel kompara atesto, kiam oni iam bezonas tian.

Iluziismo kaj materialismo

De JUAN RÉGULO PÉREZ

Nia hispana samideano donas kelkajn vdpunktojn pri la romano Don Kihote kaj el sia traktado faras konkludojn pri la nuntempa mondostato kaj pri esperantismo. Bedaŭrinde la plej grava romano de la tutmonda literaturo estas tre malmulte legata en la Nordo, verŝajne ankaŭ en la pli multaj aliaj landoj. Tial la temo certe ŝajnos fremda al multaj, oni ne havas desirindan antaŭscelon. Per iom da atento kaj bona volo vi tamen certe povos bone kapti la esencajn pensojn. — La verkinto uzas la vorton pikaro (kaj de tio pikareco) por la hispana picaro, la heroo de la hispanaj friponromanoj. La vorto estas generale tradukita per fripono, kaj tiu vorto respondas al ĝia senco. Mi tamen ne anstataŭigas pikaron per fripono, ĉar la aŭtoro parls uzas la vorton kun pli vasta senco. Li difinas ĝin jene: "Pikaro ne estas krimulo, tamen apartenas al spoco de friponoj. Li havas malmultajn moralajn barojn, speciale por aktivi vivrimedojn, malgraŭ tio foje donas moralajn maksimumojn; kvankam pekulo li estas bona diskredanto; li estas maldiligenta, ne taŭgas por regula laboro; li ofte ŝtelas sed ne rabas; li estas ruzo, genia, neantaŭvidema; li partoprenas ĉiujn problemojn de sia epoko; li estas la pratipo de multaj karakteroj de la hispana socio dum XVIa kaj la XVIIa jarcentoj; malgraŭ ĉiuj mankoj li montriĝas simpatia." Ne rigardu lian vorton kiel novan esperantan. Ĝi estas hispana vorto uzata por momenta bezono.

S. E.

Dum la klasika, t. n. ora epoko de la hispana literaturo, la hispana genio donis al la tutmonda kulturo du ĉefheroojn: la kavaliron Don Kihoto kaj lian serviston Sanĉo.

Tiu ĉi artikolo ne volas doni novan interpreton al la klasika verko "Don Kihoto". Sed ĉar estas karakterize por literatura ĉefverko el kiu ajn epoko, ke ĝi montras al diversaj legantoj diversajn aferojn, mi donas jen kelkajn marginajn notojn de "Don Kihoto". —

Unamuno, moderna hispana pensulo kaj beletristo (mortis en 1936) kaj unu el la plej sagacaj interpretintoj de la verko de Cervantes, supozas, ke "Don Kihoto" iĝis tiel enhavogranda dum la verkado, ke ĉe Cervantes mem ne povis ĝin kompreni. Tial Unamuno rekomendas, ke oni legu "Don Kihoton" same, kiel oni legas la Biblion: tiel ĝi

estos por ĉiuj neelĉerpebla konsolfonto, bona kaj renoviga instruo.

Cervantes edukiĝis en la lastaj tempoj de la plej granda glorepoko de la hispana historio. Mem li tuŝis la oran randon de ĝia mantelo: li ĉeestis la gloran tagon de Lepanto. Sed ĉar tiutempe kreskis en Hispanujo ruzo kaj rutino, li ankaŭ spertis la grandajn malvenkojn de Filipino la IIa, antaŭsignojn de la estonta dekadenco.

Kaj tiam, ĉe la sojlo de la XVIIa jarcento, Cervantes komprenis, ke por lia patrujo definitive velkis la pasinta kavalira idealo. Forpasis por ĉiam la epoko de Garcilaso de la Vega, Ignacio de Loyola, Teresa de Jesus. Nun regas ĉirkaŭ li la epoko de la pikaro: Lazarillo de Tormes, Guzmán de Alfarache, El buscón Don Pablos estas la novaj herooj. Ruzo, pikareco kaj rutino: jen la faktaj realoj, anstataŭ tiuj de idealismo kaj kavalireco.

Cervantes komprenis sian tempon. Kaj li eltombigis Don Kihoton, la kavaliron de la idealo, kaj metis ĉe lian flankon Sanĉon, la heroon de ruzo kaj rutino. Cervantes celis montri al la hispana mondo, kia povas kaj devas esti la vera kavalireco kaj kia estas la vera sed foriginda pikareco. La kavaliro — la heroo — celis venki la pikaron — la malheroon. Tiel ekiras tra la vasta etendiĝo de sia lando nia brava kavaliro, la saĝa frenezulo, kiu per sia kuraĝa ekzemplo instruas al la mondo la regulojn de vera kavalireco, kaj samtempe montras kion signifas ruzo, malico, rutino kaj pikareco.

Sed, laŭ la diro de Unamuno, post la ekiro Don Kihoto kreskis tiel grandioze, ke Cervantes ne plu estis lia kreanto. Cervantes estis nur la peranto inter sia kreaĵo, kiun li obeis, kaj la cetera mondo. Cervantes estis nur la esprimilo de historia realaĵo. Don Kihoto kaj Sanĉo fariĝis kaj restas pli karnaj kaj ostaj ol Cervantes mem.

Don Kihoto eliras por venki la pikarecon — la ruzon kaj la malicon — kaj liberigi sian Sinjorinon Dulcinea, kiu simbolas Hispanujon. Ĉe la sojlo de la morto, Don Kihoto

malfreneziĝas. Sed Dulcinea ne liberiĝis. Hispanujo restas regata de pikareco, de ruzo kaj rutino, de iluziismo kaj sencela mensostreĉo. Nur la brava kavaliro elsorĉiĝas: por trovi, ke li vivis kaj luktis senutile, por vidi malaperi en la malproksimo lia nobla idealo, por konstati, ke labori profite al la komuno estas sencela fantaziaĵo, pasema songo...

Ĉu la vizio de Cervantes estis falsa? Ĉu li profetis erare? Ne, tute ne! Ĉar Don Kihoto simbolas la malĝustan vojon kondukantan al iluziismo, kaj Sanĉo simbolas la ne pli ĝustan, kiu kondukas al materialismo! La historio pravigas la cervantesan kreaĵon. De tiu tempo la hispanoj estas Don Kihotoj kaj Sanĉoj. Kaj kiel traktis Don Kihoton kaj Sanĉon iliaj samtempuloj, tiel batis, mokis kaj komplete malŝatis la hispanan nacion ĝiaj najbaraj potencoj.

La legado de "Don Kihoto" instruas al ni, ke estas tiel danĝera la troa idealeco, kiel troa manko de ĝi. Ambaŭ ekstretoj estas evitindaj.

Zamenhof vivis en mondo simila al tiu de Cervantes. Ankaŭ li kreis noblan kavaliron por montri al la homoj, kiel povas kaj devas esti la vera lingva kavalireco. Li sendis ĝin tra la etendiĝo de la tuta mondo. Kaj kiel "Don Kihoto" esperanto iĝis tiel grandioza dum la laboro de Zamenhof, ke li ne estas plu ĝia aŭtoro: Zamenhof obeas sian kreaĵon (Reformprojekto de 1894). — Nia brava kavaliro Esperanto celas liberiĝi sian Dulcinean — la Homaron — de la lingva rutino kaj pikareco. Ĝi jam venkis batalojn kontraŭ la rutinon kaj la ruzon (Skismo de 1907). Ĉar ĝi estas pli reala, socie-historie pli vivopova ol Zamenhof mem!

Ni, la esperantistoj, estas la animo de tiu kavaliro. Tial ni zorge evitu la iluziismon, por ke ni ne iĝu saĝaj kiel Don Kihoto: saĝaj pri rezigno je nia nobla idealo. — Sed same

zorge ni evitu la materialismon, por ke ni ne iĝu fuŝpensaj malsaĝuloj, kiuj pro nekomprene forturnas nin de la noblaj idealoj.

La nuntempa mondo montras al ni la danĝeron kaj de iluziismo kaj de materialismo. Idealismaj homoj kreis Ligon de Nacioj: iluziismo. Nun, kiel nia Don Kihoto, ili elreviĝe konstatas, ke ili laboris por vana fantaziaĵo, por reva kastelo. — Materialismaj homoj nur atentis la kontraŭan flankon: brutan forton, materian bonstaton. Kaj jam ili spertas kiel sencele kaj malĝoje estas nura servo al la materio. Kaj certe, kiel nia Sanĉo, ili reiros al sia hejma laboro kun la sento de senfrukta peno por afero, kiun ili ne komprenis...

Sed ni, esperantistoj, modernaj kavaliroj de la internaideo kaj servantoj de ĝia formala, materia vivo, havas taŭgan lecionon en la senreviĝo de nia genia kavaliro Don Kihoto kaj de lia servisto, la manĝema kaj dormema Sanĉo. Zamenhof montris la rektan, solan vojon, tiun, kiu kondukas nek al iluziismo nek al materialismo. Kiel ege prave diras S-ro Engholm en nro 1 (1943) de "La Espero", ni havas la formulon por nia agado. Ĝi troviĝas en la kongresaj paroladoj kaj poemoj de Zamenhof. "Simila al la lingvo tiuj verketoj ne ŝajnas speciale rimarkindaj al homo, kiu legas ilin sen multe da atento kaj sen profunde kompreni ilian sencon. Sed ju pli oni studas ilin, des pli mirindaj ili ŝajnas, kompareblaj al la spiritofortaj verkoj de profetoj kaj kredofondintoj, kompareblaj al la negrandaj sed gravegaj konstituciaj dokumentoj de mondogravaj nacioj".

Ilin ni studu kaj laŭ ili ni agu celante al la homeca interkomprena konduto!

"Je la Nomo de la Vivo" De EINAR HULT

E. Izgur, ruso, estas eminenta en la laborista esperanta movado. Lia libro Je la nomo de la vivo estas kvazaŭ-filozofia verko en kvazaŭprofeta stilo. Troviĝas en ĝi bonaj aferoj en tioma grudo, kiom kvazaŭfilozofio povas esti bona — sed estas ankaŭ multe da sensecaĵoj. — En la partoj inter citigoj mi faris neniujn lingvajn ŝanĝojn, ĉar estas citado.

S. H.

Ne estas mia intenco fari resumon pri la libro kun la supra nomo kiun verkis la fama poeto-verkisto E. Izgur. Mi volas nur fari kelkajn komentojn kaj citiraĵojn, kiuj koncernas demandojn en lia verko, kiuj ĉiam aktualas kaj precipe en la nuna tempo. Jen li:

"Kun furiozo, inda por malsategaj hundoj, la homoj sin ĵetis unu sur la alian, ne sciante pro kio, ne komprenante kial, ne pensante pri la senco, ne serĉante la pravigon ... Kaj iafaje ŝercante kaj ridante ... En ĉi infero, kie la tuta Vivo estis servado al la Morto, la homoj en ĉevalbredejoj kreskigis multelportivajn rasojn de ĉevaloj, — sed la plej sanan parton de sia homa raso, en disfloro de Vivo kaj fortoj, faris mortigitojn kaj sendis buĉadon.

La homoj celis fari la Vivon oportuna, alloga kaj bela, kaj en mallonga tempo, kun helpo de militflamoj formanĝegadis kaj detruadis riĉaĵojn, ŝparitajn per malfacilaj laboroj de vicoj da generacioj dum daŭro de jarcentoj."

Sendube ni homoj estas strangaĵ, ĉar unue ni pene konstruas domojn kaj palacojn, sed kiam ĉio estas preta ni per militoj detruas ĉion, kion ni kreis. Ŝajne la bestoj ludas pli gravan rolon en socio ol la junuloj, kiun ni sendas al la batalfrontoj por mort-sangi. Kion diri pri tia kulturo kaj civilizo? Ĉu la produktado de aerŝipoj, per kiuj ni povas bombi urbegojn kaj vilaĝojn, estas atesto pri alta kulturo? En la nuna tempo sciencistoj kaj inĝenieroj konkuras por inventi la plej efikajn mortigilojn. Unuflanke ni agitas por altigo de naskiĝoj, aliflanke ni per ĉiuj rimedoj provas ekstermi la homojn, kiuj jam naskiĝis ...!

"La hom' por la hom' estas lupo" ... tiel skribas Izgur ie en sia verko, kaj ĉu ni povas malpravigi lin? Ĉu ni ne simile al la bestoj pretas ŝteli la manĝon el la buŝo unu de la alia? Kiom da homoj en la nuna tempo sekvas la regulon, ke oni amu sian proksimumon tiel, kiel oni amas sin mem? Ĉu ni ne egoiste pensas nur pri propraj feliĉoj kaj bonstato?

Ĉu la homa egoismo ne estas kaŭzo de multa malbono en la

mondo? Ni ne faras multe por plibeligi la vivon de niaj proksimumoj, sed ofte staras kun malmola koro kaj rigardas homon, kiu suferas ...

Ie en sia verko Izgur demandas: "Ĉu havas serpento rajton mordpiki la homon, kiam li piedpremas ĝian gorĝon? ... Por kio do la serpento kolektis venenon en siaj dentkarnoj, se ne por ataki aŭ defendi sin? Ĉu agas juste ĉevalaro en la stepo, kiam ili, celante defendi sin de lupoj, atakantaj ilin, kunigas en malvastan rondon kaj per malantaŭaj piedoj elbatas dentojn de iliaj malamikoj? ... Ĉu ne elvokas ili per tia agadmaniero koleregon kaj kruelligon de la lupoj? ... Kiu do havas rajton ĵeti sur min ŝtonon de riproĉo pro tio, ke sur la vojo al mia celo, mi eluzas perfor-ton, kaj iafaje, kiam tio ĉi estas necesa, ĉe sangan perfor-ton super la rabuloj, kies ungegojn mi detranĉas, kaj kies dentojn mi elbatas por senmalutiligi tiujn ĉi rabulojn por mi kaj por la similaj al mi? ..."

"Aŭdu do, kion mi diras al vi, miaj infanoj: — Se mi, via patro, ial ekstaras barile sur via vojo al komunhomara feliĉo, estu via vojo trametota trans mi ..."

Ĉu la homoj vere devas tratabi al si vojon por atingi feliĉon kaj bonstatojn? Ĉu ni ne povas krei paradizon kaj vivindan socion eĉ sen uzi perfor-ton? Sendube tio estas ebbla, sed ĉu ni volas interkonsenti pri la irota vojo? Ni krias pri unuigo, sed kion ni faras por unuigi? En ĉiuj kampoj de la socio ni dividas nin laŭ klasoj aŭ socigrupoj. Ĉiu grupo starigis propran vojon por atingi la celon al kiu ni ĉiuj aspiras. Ĉu ni agas racie kaj prudente? Ne, ni certe agas malprudente kaj neracie, kaj kion ni gajnas per la malunueco? Ĉu ĝi ne grave malfaciligas ĉiujn niajn klopodojn en la laboro konstrui mondon, kiu al ĉiu donu la saman ŝancon sukcesi en la vivo? Aŭ ĉu ni ne celas al tio? Aŭ ĉu Izgur pravas en sia aserto: "La hom' por la hom' estas lupo" ...? Li skribas interalie: "Fortuloj rajtas! Dividu kaj regu, ĉar se vi ne perfortos aliujn, do aliu perfortos vin; se vi ne dividus; aliu dividus; se vi ne regos, aliu kaptos potencon en siajn manojn por regi vin ..."

Kiuj vere regu la mondon? Ĉu eble tiuj, kiuj per la glavo en la manoj volas konduki nin al la celo? Ĉu ni sekvu tiun, kiu plej laŭte krias kaj kiu per perforto volas bati al si vojon kaj potencon? Aŭ ĉu ni per aktiva laboro en la diversaj societoj, kiujn la homoj kreis por plibonigi la mondon, provu realigi kaj atingi la celon? Kion vi diras pri la ofte tro rigora asertoj, kiujn ni trovas en la libro de Izgur? Ĉu tiu konata poeto eraras en sia koncepto pri la vivo? Kiel ajn, liaj verkoj estas studindaj kaj pensigaj kaj kvankam oni ne povas ĉie samopinii kun li, ni tamen havas utilon de la legado de liaj verkoj.

"La angla karaktero"

Venis du komentoj pri la art. de Sturmer en nro 2. Por ŝpari lokon mi nur ekstraktas la pli gravajn aferojn.

E. Hult: ... Ankaŭ la svedoj estas bestamikoj, sed mi ne kredas, ke ni testamentus grandajn sumojn por rifuĝejoj al senhejmaj katoj kaj hundoj en tempo, kiam milionoj duonmalsatas pro manko de laboro. Mi tute ne povas samopinii kun Sturmer, ke tiu trajto havas agrablan flankon. Kontraŭe ĝi estas kritikinda.

Sturmer skribas, ke la esperantismo emas kovri naciajn diferencojn per "tavolo de siropa parolo". Kompreneble ne estas eble en kongresoj fari necesajn studojn pri diferencoj en karaktero kaj kulturo. Sed ĉu io malhelpas nin ekster la kongresoj kompletigi scion pri lando, kies kulturo nin interesas? Dank' al rekta kontakto kun personoj en aliaj landoj, ni povas studi kiun ajn landon aŭ popolon. Kongresvizitoj ne donu malfavoran impreson al la partoprenantoj, pro tio la "siropa" parolo. Ĉu "vinagra" estus preferinda?

Sturmer pravas en tio, ke ekzistas diferencoj, ankaŭ en tio, ke ni atentu kaj studu ilin. — Ĉu ni ne veturas al kongresoj antaŭ ĉio por diskuti la irotan vojon, kiu plej rapide kaj efike kondukos nin al la dezirata celo?

F. Szilágyi: Homarismo aŭ, laŭ Zamenhof, homaranismo apenaŭ povas signifi malatenton de historiaj kaj aktualaj popolaj diferencoj — kiel Sturmer asertas. Ĝi devas signifi interproksimigon de reciproke efikantaj kulturoj. Unuopuloj povas troigi homaranismon, en sia kerno ĝi estas same racia kiel la boneco mem. Diferencoj ekzistas kaj ekzistos, estus eraro kredi tujan ĉeson de ĉiu historia kapdoloro, kiu nun pli ol iam turmentas ŝtatestrojn kaj ŝtatanojn. Sed sendube oni devas fiksi la direkton de la vojo laŭ pozitiva volo.

Por ilustrati la anglan eksterordinaran amon al hejmbestoj, li mencias, ke hundo estas nomata "li". Mi ne kredas, ke arbitra uzo de pronomo klarigas la bestamon, tion certe faras la rakonto mem. La grado de bestamo ne dependas de tio, ĉu certaj lingvoj uzas seksomontrajn pronomojn aŭ ne por bestoj.

Sturmer diras: "Esperantisto studu ne la homarismon, sed la historion kaj literaturon de la homoj, se li deziras internacian komprenon." Mi volus preferi diri: Esperantisto studu la homaranismon sed sur la baso de kono de ekzistantaj kulturaj valoroj kaj apartaĵoj de diversaj popoloj. Se "Kristo amis ne la homaron sed la homojn", li certe faris tion por povi fine ami la homaron.

*

Fine rimarkigo de mi. Chesterton per la citita esprimo volis diri, ke estas senseco diri, ke oni amas la homaron. La homaro estas nura abstraktaĵo. Nur unuopajn homojn oni povas ami. Tion certe volas diri ankaŭ Sturmer. Kaj tio estas vera. Por Kristo nenion signifis partioj, nacioj aŭ aliaj grupoj. Laŭ li la senco de la vivo de la individuo estas la perfektigo de li mem per propra vivado.

Sturmer uzas la vorton homarismo. Zamenhof uzis la vorton homaranismo, kaj ĝi estis adekvata al lia penso. Li celis ne la abstraktan homaron sed homojn. Kiel mi skribis en la unua nro de M.R. (Por la homo) la esperanta movado pli ol iu alia estas movado por bono al la individuoj. Ĝuste en tio estas ĝia granda valoro. Kaj ne estas tre grave, se la esperantistoj foje uzas la vorton homaro anstataŭ ĉiuj homoj.

Sed — bedaŭrinde Sturmer tamen multe pravas. En nia movado kiel en la pli multaj troviĝas tre multe da belaj frazoj sen respondaj realaĵoj. Ni uzas belajn abstraktajn vortojn kaj kredas, ke tio ŝanĝos la mondon. Sed ju pli pompaj vortoj estas, des pli senefikaj ili estas. Pli bone estas trovi manieron fari homon ĝentila kaj bonkonduta en la ĉiutaga vivo ol skribi dikan libron por la savo de la homaro.

S. Engholm.

Somera vespero ĉe la kabano

La betula foliaro kribras
lastan lumon de la sunsubir'.
Nur folioj de tremol' ekvibras
pro malforta noktoventa spir'.

Silentiĝis nun la taga bruo,
ĉiuj voĉoj akraj mortis for.
Spacon ombras la krepuska bluo
kaj trankvilan dolĉon sentas kor'.

Super pace jam dormanta tero
pli serena volbas sin ĉiel',
tra la blu-difuzo de l' aero
palpebrume jen ekbrilas stel'.

Birger Gerdman.

Fajreroj

Mallarĝa tunelo la monton traboras.
Nin sube, vermetojn, mallumo doloras,
sen ĝuo, sen belo ...
Mallumo, haladzo, sufoko:
jen tria fatal' de l' tunelo.
— Ĉu nin mortopremos la roko?
— Ĉu iam ni vivos en taga sunĝuo?
Sed longe, timeme en truo
ekiumas la Stelo.

*

Kiel fandas suno la neĝon sur la ter'
tiel ŝvebas revoj
kiam venas sufer'.

*

El ombro forflugi,
rifuĝi de l' Sorto ...
Sed Sorto kaj Ombro
nin sekvos ĝis morto.

Amalia Niñez Dubús.

MALGRANDA REVUO aperas kvaronjare. Prezo 1 kr., je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. (inkl. sendkoston). Abono akceptata. Antaŭe aperintaj n-roj haveblaj.

Redaktoro-eldonanto: *Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika.*
Poŝtĉeka konto 26 80 23.

Peranto por Suomujo: Rehtori *Joel Vilkki, Somero.* Poŝtĉeka konto 602 53. Prezo 12,50 mk (inkl. sendkoston).